# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 22/12/2022 Sescentdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 685,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **150,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **144,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **93,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

**KIO PAROLIGAS PAPAGOJN - KAJ KIO NE**

19-a de decembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**


Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

## La novaĵletero, (Roger), deziras al siaj legantoj

# Feliĉan Kristnaskan Tagon







**Ni ĉiuj deziras**

**Pacan Mondon**

**Super Ĉio**

# La Zamenhoffesto en Sidnejo



La 17an de decembro okazis la Zamenhoffesto en Sidnejo. Unue Jonathan kiel prezidanto bonvenigis la ĉeestantojn. Krom Esperantistoj venis ankaŭ studentino de la universitato de Sidnejo kiu verkis antaŭ ne longe artikolon pri la Esperanto-domo. Ŝi venis kun pluraj aliaj studentoj.



Ni babilis kaj ni iomete manĝis interalie verdajn stelajn biskvitojn.

Poste Rainer Kurz prelegis pri rifuĝintoj en Germanio. Sekvis ludo en kiu ni devis solvi enigmojn por malfermi skatolon ŝlositan per pluraj pendseruroj. Post tio venis la puzlokonkurso en kiu la partoprenantoj devis provi kunmeti kiel eble plej rapide puzlon de 200 pecoj. La puzlo estis speciala puzlo kiun ni mendis en 8 ekzempleroj kiu montras diversajn Esperanto-poŝtmarkojn. Pli ol 8 personoj deziris partopreni, do ni havis teamon de 3 personoj kaj teamon de 2 personoj.



Organizi puzlo-konkurson estis mia ideo kaj mi do scivolemis kiel la Esperantistoj reagos. Ŝajnas al mi, ke ĉiuj ege ĝuis tiun sperton.

Multaj ne kunmetis puzlojn dum pluraj jaroj supozeble kaj faris tion tre malrapide, sed ili tamen ŝatis tiun programeron, kiu estis malsama al kutimaj programeroj. La plej rapida estis la junulo Sam kiu bezonis nur proksimume duonhoron, la dua estis Chris kiu bezonis 50 minutojn. La teamoj ne sukcesis pli rapide ol Sam kaj Chris.

Jen fotoj: Sam kiu venkis en la puzlo-konkurso, Chris kiu estis dua, Rainer, ktp



Amike, *Nicole Else*









# Zamenhofa Vespero Melburno

"20 Esperantistoj ĝuis vesperon de bongusta manĝaĵo kaj poste, muzikon de Suzanne Palmer-Holton kaj Roberto Leereveld.

La Zamenhofa prelego estis pri la nova libro, la Galerio de Esperantistoj fare de Katja Steele kaj Charles Stevenson kiu distris nin pri tre interesaj pasintaj Esperantistoj. Aliaj interesaj prelegoj estis de Joanne Johns pri artefarita inteligenteco, honorigo pri Marcel de Heather Heldzingen, kaj legadon de ĉapitro el sia novelo skribita de Matt Beshara. Ni finis la vesperon per La Espero.

*Heather Heldzingen*
















**3ZZZ** ...En la elsendo de la 19a de decembro 2022 aŭdiĝas pluraj artikoloj pri malkovroj rilataj al malnova lingvo kaj la origino de lingvo. Troviĝas informoj pri la spacteleskopo James Webb kaj pri rimedoj por senti sin pli bone. Se vi ŝatas kristnaskajn kantojn , vi ĝuos la elektitajn kantojn

www.3ZZZ.com.au aŭ

www.esperanto.com.au

*Franciska Toubale*



Membroj de BES ĉe la ĝeto en Redcliffe, 15an de Decembro




Estimata membro de BES Paûlo montras arton de Linda kaj Tomo ĉe la restoracio en Redcliffe dum la Zamenhofa Festo



membroj de BES ĉe la "BEE GEE'S Vojo " en Redcliffe dum Zamenhofa Tago.



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.
La 17a de decembro estis la tria sabato. Venis Roger, John, Chris kaj Ian

*Roger Springer*